

Núm. 3

MARZO 1949

Ruzafa, 7

VALENCIA

(ESPAÑA)

Nuestro objetivo

Admitida por toda persona dotada de sentido común la conveniencia y necesidad de un idioma auxiliar mundial y conocida por todo aquél que tenga mediana cultura la perfecta idoneidad del Esperanto para dicho fin, se deduce claramente toda la lógica que nos asiste al esforzarnos en difundir el idioma de ZAMENHOF por todos los medios posibles.

Dado el materialismo práctico que dá la tónica a la época actual, los que están fuera de nuestro movimiento pertenecen a tres categorías distintas: los convencidos de nuestra razón, pero incapaces, por abulia, para llevar a cabo el ligero esfuerzo de aprender nuestro idioma; los que creen que el Esperanto tardará, a pesar de su razón, demasiado tiempo para triunfar, y, finalmente, los que nos juzgan maníacos y hasta revolucionarios peligrosos.

A los primeros hay que convencerles de que, la mayoría de los esperantistas han aprendido el idioma auxiliar a ratos perdidos, y no a costa de penosos esfuerzos, gozando intensa y progresivamente con su nueva adquisición.

A los segundos, se les debe hacer ver que, con lo ya obtenido, el premio al liviano esfuerzo es más que sobrado, y que las satisfacciones que produce a cada momento son incomparables.

A los que nos tachan de anormales, les contestaremos diciendo que también lo fueron en su tiempo Galileo, Stephenson y Santos Dumont.

De nuestra inocuidad social pueden haber dado una sólida garantía S. S. el Papa Pío X y Alfonso XIII, docenas de Obispos y centenares de hombres de Estado de tendencia nada revolucionaria. La única revolución a que aspiramos es muy pacífica: llegar a que todos los hombres tengan, por medio de un idioma común, mayor tolerancia, mayor acercamiento, y, paulatinamente, puedan considerarse como hermanos, por encima de razas, religiones, idiomas y fronteras. Ambicioso es nuestro objetivo, no lo ignoramos. Sabemos que el camino es penoso, largo y sembrado de espinas. Por ese camino anduvo, en busca del mismo ideal, Aquél a quien todos denostaron llamándole... ¡galileo!

PLEJ simpla esperantisto neniam estas vulgara homo. Tiu persono, ordinare sen granda intelekta kapablo, sed kun klara percepto kaj propra sperto pri la utilo kaj signifo de Esperanto, scias la manieron kompreni, per la spirito de sia lingvo, la lingvon de la spirito de alia persono, kiu vivas, penas, laboras, sopiras kaj amas tie, malproksime, trans la limo nacia...

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● Los esperantistas españoles estamos de enhorabuena. La constitución de la Kuracista Esperanta Asocio (K.E.A.), es un hecho, y su primer cuidado ha sido la iniciación de un cursillo de Esperanto para médicos y estudiantes de Medicina. Dada la rapidez de su comienzo, la imposibilidad de hacer la debida propaganda y la proximidad de los exámenes, este primer cursillo no tiene todavía un número muy elevado de alumnos. De todas maneras, por el Colegio de Médicos de Valencia asoman nuevas caras, y es de esperar que, lanzada la semilla, en los próximos cursillos sea muy satisfactorio el número de alumnos. Felicitamos muy de veras al Presidente de K.E.A., Dr. D. Lloréns, así como a los instructores, Dres. E. Tudela y R. Herrero, cuyos laudables esfuerzos se ven premiados por la patente extensión del Esperanto entre las clases intelectuales.

Por otra parte, sabemos que un grupo muy numeroso de tipógrafos de la casa «Cantos y Ripoll», que edita nuestro BOLETIN, ha manifestado su entusiasmo por la lengua auxiliar, y dentro de poco comenzará a instruirles nuestro compañero L. Hernández; él es una garantía de que el éxito sea cierto.

Nuestro compañero F. Rivelles, en su reciente visita a Zaragoza, ha podido comprobar cuán densa y fervorosa es la actuación de los esperantistas aragoneses. Asistió allí a una agradable reunión, al final de la cual los zaragozanos enviaron un saludo cariñoso a H. E. F. y a los esperantistas valencianos. Desde estas columnas agradecemos cordialmente el gesto a los hermanos de Aragón y, al devolvérselo, hacemos votos por una progresiva y colaborante «frateco».

A todos, nuestro saludo fraterno, y a la «grandokula feino», nuestra ferviente admiración.

● De todas partes de España, recibimos constantemente alentadoras adhesiones. En Barcelona y Bilbao, ciudades en que el esperantismo era una realidad floreciente, vuelven a la actividad los esperantistas dispersos, y sabemos que, en breve, será un hecho la formación de los grupos respectivos, adscritos a nuestra H. E. F.

Con estos grupos y el muy numeroso constituido en Zaragoza por «Frateco», nuestro movimiento vuelve a emprender con nuevos bríos, la marcha progresivamente satisfactoria que las malditas guerras detuvieron... pero por poco tiempo.

● En ALEMANIA se ha producido una decisión de importancia para nuestro movimiento. La Asociación de Maestros de Baviera aprobó por unanimidad la siguiente proposición: «La Directiva de la B. L. A. reconoce al Esperanto como valioso medio de educación para idea de paz y humanidad. Saluda la adopción del Esperanto como asignatura en las escuelas públicas e insiste acerca de los jóvenes maestros para que se instruyan rápidamente en la lengua auxiliar».

En Münich, el consejero de instrucción Ederer apremia a todos los maestros de la ciudad a que se inscriban en los cursos de Esperanto.

En Francfort, el prefecto ha declarado obligatorio el estudio del Esperanto en la escuela oficial de Policía.

En toda Alemania crece pujante la tendencia a la adopción del Esperanto como lengua auxiliar, y a su enseñanza en las escuelas primarias. Se puede decir que no hay ciudad ni pueblo importante en donde no haya sociedad esperantista. Los cursos, tanto para adultos como para estudiantes, son numerosos.

● En el JAPON, el Sindicato de Ferroviarios del Estado (630.000 miembros), y el Sindicato de Comunicaciones (370.000 miembros), han suscrito la petición a la O. N. U., para que se considere al Esperanto como lengua oficial para dicho organismo. Con ello, la cifra de peticionarios alcanza los TRECE MILLONES.

Siempre creímos que la decisiva sanción triunfal para el Espernato vendría de Alemania y el Japón, países de alta cultura técnica, que, para relacionarse con los demás países, especialmente con sus vencedores, rechazarían, por consideraciones de lastimado patriotismo, el idioma del vencedor. Las anteriores noticias confirman nuestra impresión, aunque nunca creímos que fueran tan halagüeñas ni tan tempranas. Seguramente el ejemplo cundirá en otros países.

● En ROMA, tuvo lugar, en la gran iglesia San Andrea della Valle, el llamado «Sermón de las Naciones». Niños y muchachos de todas las naciones rezaron y cantaron en sus respectivos idiomas ante obispos, el ministro italiano de Instrucción Pública, embajadores, diplomáticos y diputados: al final, para resumir la universalidad de la ceremonia, un muchacho declamó en Esperanto la poesía llamada «Noche de Navidad».

● En FINLANDIA, la Asociación Central de Sindicatos, con cerca de 350.000 miembros, también ha suscrito la petición a la O. N. U.

● Tenemos, pues, la satisfacción de recoger en este número de nuestro BOLETIN un puñado de noticias, que seguramente producirán honda satisfacción a nuestros lectores. El Esperanto se difunde, gracias a la lógica... y a los esfuerzos de sus propagandistas. Sigamos, pues, propagando con entusiasmo, ya que la causa es buena y el éxito es seguro.

DOS OPINIONES VALIOSAS

Profesor PICARD.—Estoy convencido de que, en el campo de las ciencias, el Esperanto puede ser de una gran utilidad.

Cardenal PIFFL, Primado de Alemania.—Que nuestros niños estudien ahora el Esperanto; es la lengua mundial del porvenir.

HISPANA PIONIRO MORTIS!

En la antaŭa numero ni povis nur kelkvorte sciigi la forpason de nia samideano Vicente Inglada Ors; li estis unu el la plej malnovaj hispanaj esperantistoj. Kvazaŭ viva relikvo el tiu heroa kaj sindonema epoko de la komenco, li konservis ĝis sia lasta spiro la fervoron kaj fidon al Esperanto. Treege maljuna, kadukiĝinta, preskaŭ blinda, devigata al daŭra sidado en apogseĝo, lia korpo tamen ankoraŭ vibris emocie kiam samideano lin vizitis kaj lin alparolis per la agrablaj vortoj de nia lingvo. Li apartenis al la Stabo, kiel kolonelo, kie li estis tre ŝatata, de plej superaj oficiroj, kaj estimata de la simplaj soldatoj pro lia komprenemo kaj bonkoreco. Lerta kaj aktiva esperantisto, ne nur flue li parolis la lingvon kaj majstre verkis librojn, tradukis verkojn aŭ ĉizis delikatajn versojn, sed en kunlaboro kun alia samideano li eldonis la plej gravan gramatikon de Esperanto por hispanlingvanoj. Estis vera plezuro por ĉiu esperantisto aŭskulti lin; tio estis ĝuo tute ne imagebla; eĉ, foje, Zamenhof mem deklaris al li: «Mi kreis la lingvon por ke la homoj de la tuta mondo interkompreniĝu kaj... per ke vi ĝin parolu.» De antaŭ kelkaj jaroj, bedaŭrinde, pro aĝo, li komencis perdi lia vidkapablon; tio tute ne lasis lin legi nek skribi. Tial, do, li ne povis fini tre gravan verkon, kiun li havis en preparo; temis pri kompleta vortaro, tiel ampleksa, ke ĝi bezonus kelkajn volumojn. Interesa verko, ege bezonata de la hispanlingva esperantistaro. La morto lin forportis antaŭ ol li metus finan punkton al tiu valora verko. Ĉiam ni havos al li la bonan memoron, kiun plene li, sindona kavaliro de la esperantismo, meritas. En laboro por nia afero, li neniam laciĝis, li ripozu do nun en eterna paco!

INTER LA PROZO DE LA ESPERANTISTA GAZETARO

Ankoraŭ, verŝajne, ne perdiĝis la eĥoj de mia lasta babilado, kiam per ĝojaj saltetoj mi atentigas vin pri mia refoja ĉeesto. Agrabla, tre agrabla, estas las tasko informi vin pri la plej freŝaj kaj interesaj seiigoj de nia internacia gazetaro, sed mia ridetema vizaĝo kelkfoje serioziĝas pensante, ke ĉiu nova saluto mia ankaŭ estas anonco, ke plia monato enŝoviĝis en la konton de via aĝo... Tamen, estu certa, kara amiko, ke mi ne kulpas se la tempo ne haltas kaj ne ĉesas verki sur la paĝojn de siaj tagoj la historion de la homoj el kiuj ankaŭ konsistas la popolo esperantista. Por tiu ĉi raporteto mi ne sukcesis legi multe da materialo, sed mi havos la ŝancon prezenti al vi novan kaj malnovan titolojn, kiujn ĝis hodiaŭ mi ne povis mencii: Jen unue LA PONTO, oficiala revuo de Germana Esperanto-Asocio, kiu bone redaktita kaj bele prezentata redaŭrigas la interrompitan agadon disvastigi nian lingvon en tiu lando, kie iam tiel pompe ĝi floris. Tra la paĝoj de sia gazeto, la germanaj samideanoj montras sian emon al bona ordo kaj taŭga organizado: informoj pri kursoj, demarŝoj kaj sugestoj favoraj al Esperanto ĉe la aŭtoritatuloj de la diversaj zonoj, ordigita listo de kunvenejoj en la ĉefaj urboj kun precizaj indikoj pri tago kaj horo, lingva angulo gvidata de kompetenta fakulo kaj viglaj preparoj por la dua postmilita germana Esperanto-Kongreso, kiu okazos de la 4.ª ĝis la 8.ª de venonta Junio en Göttingen. Certe la ĉeestantaro estos multenombra en impona publika manifestacio, kiu pruvos per faktoj, ke neniel nian movadon povas detrui ŝanĝiĝemaj cirkonstancoj malfavoraj. En artikolo pri korespondado, oni rekomendas korespondi interne mem de la lando, se troaj malfacilaĵoj baras la eksterlandajn komunikojn: jene oni skribas: «Ankaŭ interne de Germanio oni povas multon korespondi per Esperanto. Fakaj demandoj alie aspektas en la oriento ol en la okcidento. La interŝanĝo de pensoj certe ne damaĝas per esperanta korespondado; kaj personaj leteroj, el la diversaj partoj de Germanio pri nia movado, pri varbado kaj pri uzado de la lingvo ankaŭ estas interesaj. Ĉu amikeco inter oriento kaj okcidento malpli valoras ol perletera eksterlanda interligo?». Aparta artikolo temas (ĝuste en germana gazeto!) pri SONOLISMO, kurioza kreaĵo de bonhumora franca samideano. «Kio estas SONOLI? Silenti Naci-Lingve kun alia esperantisto, en kiu ajn loko oni estas. La tri literoj dikpresitaj donas la radikon SONOL... el kiu oni faras: sonoli, sonolismo, sonolisto, sonolado, sonolejo... Jen do la simpla etimologio! Grava afero por sonolisto estas la surmeto de la Verda Stelo, simbolo de nia lingvo: neniu povas sin proklami sonolisto ne havante sur si la verdan stelon.»

Trans LA PONTO pompas LITERATURA MONDO, la veterana revuo kun densa, valora kaj ĉarma enhavo; ŝajnas, kvazaŭ en la halo de la beletra palaco estus menueto inter Prozo kaj Verso. Bedaŭrinde, mi devas turni paĝojn kaj paĝojn, ĉar literaturo estas frandaĵo, kiun oni devas gustumi de komenco ĝis fino. Tamen, tie, ĉe la fino, mi trovis interesan polemikon inter du kompetentaj lingvospertuloj pri la tikla demando inter la formoj IO kaj UJO por la landnomoj. Mi penos ĉerpi disajn fragmentetojn: «... la unuavida kompreneblecо ludas ian rolon en la afero: la landnomoj estas efektive *propraj nomoj*, kaj ĉe ili, pli ol ĉe la ceteraj lingvaj elementoj, efikas, por eviti miskomprenojn, la neceso pri internacia aspekto de la formoj.» Se nia analizo estas ĝusta, vi devas forcedi al mi, ke la evolufortoj, kiuj forpuŝas de la uzado de —UJ— kaj alpuŝas al tiu de —I— estas nek neglektindaj nek malfortiĝontaj. Ili efektive estas el du specoj: sur la lingva tereno efikas la leĝo pri malplej granda peno (la io-formoj estas pli facile memorigeblaj, ĉar pli internaciaj); sur la socia tereno, efikas la leĝo pri imitado (oni imitas nur, kion oni rigardas

supera, kaj la io-formoj atestas pli superan stadion). Estas do nenia ŝanco, ke la esperantistaro, en sia granda plimulto revenos al la ekskluziva uzado de —UJ—.» Post tiuj interesaj opinioj mi metas finon al mia interveno. Hodiaŭ mi provis sobre garni la tablon per du solaj teleroj; antaŭ la supozo, ke bankedo sen aperitivo nek deserto ne estas kompleta, mi penos en la venonta numero variigi, kiel eble plej, la menuon kaj ornami la tablotukojn per freŝaj diantoj kaj rozoj el tiuj, kiujn la proksimeco de la Printempo komencas oferi en la valenciaj ĝardenoj. Tie, meze de mirinda harmonio de koloroj kaj parfumoj, deziras trovi inspiron por elegante vin servi kaj utile vin kontentigi.

LA LEGEMA KOBOLDETO

LA INFANOJ KAJ ESPERANTO

En nia kara kolego SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN aperis jena artikoleto, kiun ni represas kaj rekomendas speciale por studo al la hispanaj esperantistaj gepatroj:

La Germana Esperanto-Asocio havas apartan fakon por gepatroj. La celo estas, ke la gepatroj donu al la gefiloj esperantan edukadon. Verŝajne oni sin turnis al diversaj eminentaj esperantistoj kun demandoj, ĉar jene respondis s-ro M. C. Butler, Anglujo:

Pri la Esperanta eduko de miaj infanoj: Mi ĉiam kaj senescepte parolis al ili nur en Esperanto. De la aĝo 11—12-monata ili ĉiam kaj senescepte kaj tute nature parolis al mi en Esperanto. Ili parolis ĝin flue kaj nature kiel hejman lingvon. Tio estas afero, tute ebla kaj natura, kondiĉe ke almenaŭ unu el la gepatroj parolu al la infaneto dekomence nur en Esperanto. La infano parolas al patro aŭ patrino ĝuste kiel patro aŭ patrino parolas al ĝi. Mi ne instruis Esperanton al miaj infanoj, sed nur uzis ĝin tute simple kaj nature kiel ĉiutagan lingvon, kaj la infanoj tute simple kaj nature uzis Esperanton flue kaj bele kiel hejman kaj unuan lingvon. Jen ĉio!

E. Rosner, Germanujo, respondas jene: Mi mem edukis mian Esperantofilineton tuj post la naskiĝo dulingve. Mia edzino parolis kun ŝi en la gepatra lingvo germana kaj mi nur en Esperanto. Tiu dekjara edukado esperanta estis por mi la plej feliĉa periodo, ne nur kiel esperantisto, sed ĉefe kiel patro. Kompreneble la sukceso dependis de la perfekteco kaj lerteco de la edukinto, sciinte la eduklingvon. Okulfrape estis la progresoj kaj sukcesoj de la infano, irante jam en la lernejon. Sia esperantoscio multe faciligis ŝian spiritevoluon. Kaj en la mezlernejo ŝi facile lernis la anglan lingvon. En tiuj fakoj ŝi estis favoratino.



Nia aktiva samideano Sebastián CHALER staras unuavice, meze de la amikoj kiuj konsistigas la Esperanto-Fakon en la "Tarrasa-Junularo" okaze de plensukcesa leterverspero, je honoro de lia 65a jara jubileo.

La festo estis tre efika por pruvi la ekziston de nia lingva movado kaj la simpation tiun tie havas nia senlaca kaj meritoplena samideano.

Estas aparta plezuro por ni povi prezenti al la tuta legantaro la apudan bildon por ke en aliaj urboj oni sekvu la ekzemplon de nia amiko al kies vivo ni deziras bonegan farton dum multe kaj multe da jaroj por la progreso de Esperanto en Hispanio.

KIO ESTAS HISPANIO?

Ĉiuj kleraj personoj scias, ke Hispanio estas lando, kiu situas ĉe la suba maldekstra angulo de Eŭropo, oni konas ĝian tipan elstaran muzikon, ĝian mondfaman literaturon, ĝiajn gustumindajn fruktojn kaj tre ŝatindajn vinojn.

Sed multaj, eĉ kleruloj, kredas ke Hispanio estas duontropika lando, kie ĉiuj enloĝantoj ĝuas la tipan muzikon, dancas akompanate de klakado de kastanjetoj, kantas akordite al gitararo, kaj de tempo al tempo, ĉeestas taŭroludon.

Bedaŭrinde, hispana popolo gustumas tiujn amuzaĵojn nur tre malofte, kaj, ĉe pli ol la du trionoj de la lando, tute neniam. Certe, la fremdaj vizitantoj povas koni tipan folklorajn aspektojn ĉe la teatroj kaj, surloke, ĉe la grotoj en Granado.

Tio ne gravas por ke preskaŭ la tuta loĝantaro supreniras tramon, amase, por labori en fabrikoj aŭ oficejoj, ili pasie ŝatas kinon, aŭdas radion ĉiutaĵe kaj dimanĉe kriegas ĉe futbalo aŭ boksado, kiel ĉiuj.

La multkolora, brila kaj alloga bildo estas reala, sed malofte videbla, ĉar ĝi estas por hispanoj amuzaĵo, sed ne daŭra kutimo.

Pli ofta eraro estas la opinio pri geografiaj kaj klimataj kondiĉoj de nia lando. La plejmulto kredas, ke Hispanio estas ebenaĵo, milde aŭ harde sunumita, kaj, ke dikaj manteloj kaj lanaj kovraĵoj ne estas tie bezonataj.

Jen la realo : Hispanio estas la dua monta lando en Eŭropo, nur post Svislando. Plejparto situas super 500 metrojn surmare, kaj, kvankam la someroj estas varmegaj, dumvintre la malvarmo estas glacia. Temperaturoj subnulaj estas kutimaj, kaj oni suferas tre ofte —10°,— 15° kaj eĉ malpli en kelkaj regionoj. Tamen, marbordoj kaj suda Hispanio ĝuas mildajn kondiĉojn. En multaj provincoj, kiam neĝo falas, ĉiuj fotobildigas ĝin kaj promenas por vidi la maloftaĵon.

Hispanio estas pro situo, orografio kaj klimatoj, unu el la plej diversaspektaj landoj ; ni povas diri sen troigo, ke ĝi estas kiel malgranda kontinento aldonita al Eŭropo, kies ligilo —aŭ disigilo— estas la pirenea montaro.

En Galegio ĝi havas sennombrajn fjordojn, kiel en Norvegio. En Asturio kaj Baskaj provincoj, altaj valoj kiuj aspektas kiel en Svisio. Katalunio similas multe al Francio kaj ĝia ĉefurbo, Barcelono, rememoras al ĉiuj pri Parizo, sed kun hela ĉielo. La Valencia regiono etendas siajn senfinajn oranĝarbarojn ĝis la maro kvazaŭ dezirante ektuŝi per la bluaj ondoj la sunplenajn fratajn marbordojn en latinaj kaj grekaj landoj.

Balearaj insuloj estas kiel promenejo en vera latina mondo. Andaluzio estas, laŭ ĝenerala aspekto, kutimoj, muziko, kaj restaĵoj de la mahometaj enloĝintoj, vera orienta juvelo.

Tiom diversaj aspektoj estas, tamen, etnografie kaj politike, sufiĉe unuigitaj per kvin jarcentoj da centra regado, kiu, malgraŭ la diversaj lingvoj, kutimoj kaj vivkondiĉoj, prezentas al vizitanto tute tipan individuan aspekton.

Nuntempa Hispanio klopodas por havi estonton inda ja sia glora estinto. Ĝi estis la lando de Cid, Pizarro kaj Cortés, sed ĝi estis, estas kaj estos la lando de ĉiamaj Don-Kiĥotoj.

TIA ESTIS LA OPINIO...

Ludoviko, la dekkvara, la Suna Reĝo el Francio, opiniante, foje, pri Hispanio, diris : «Afriko komencas je la Pireneoj». Per tiu aserto, li signifis ke la tiamaj hispanoj estis ja ne versajanoj.

Tiu historia frazo vundis, de tiam, al hispana popolo, ĉar ĝi daŭre ofendadis ĝian dignon.

Kiam, dum la lasta mondmilito, oni legis pri la multenombraj nenecesaj kruelaĵoj, faritaj de ĝistiamaj altkulturaj nacioj, oni ekpensis dubetante : «Ĉu Afriko limas ĉe Nova Zemblo?»

Victoria del Esperanto

Siendo todo idioma un medio y un vehículo para la intercomprensión humana, deseo innato en el hombre es disponer de un idioma ecuménico, que, por su carácter universal, preste a la Humanidad el servicio excelso de la comunicación entre todos los hombres, cualquiera que sea su nacionalidad. Meta ambiciosa quizá, pero no inasequible.

El Esperanto es el idioma—no por más artificial menos idioma—que, por su trayectoria desde su creación por el Doctor Zamenhof, ha adquirido méritos y consistencia suficiente para conseguir carácter de lengua auxiliar universal. Tanto es asi, que de día en día, no ha sufrido descensos y retrasos en tal camino, sino que, por el contrario, ha mantenido en todo momento una trayectoria ascendente; y hoy puede hablarse de la victoria del Esperanto, por ser el único idioma artificial (por tanto, neutral) que tiene vida propia e importante masa que lo practica.

Así como toda idea tiene sus opositores, no podía faltarle al Esperanto sus correspondientes detractores, quienes respecto a la victoria que apuntamos del Esperanto preguntan: «En qué sentido puede hablarse de victoria? ¿Ha sido introducido como lengua auxiliar para los asuntos internacionales? ¿Se enseña ya en todas las escuelas? ¿Se puede ser comprendido mediante él en cualquier lugar? Todo esperantista reconoce francamente que no se ha alcanzado todavía estas metas, pero hay posibilidad de conseguir todas estas finalidades y otras más. Francamente, hemos de contestar que no está reconocido el Esperanto oficialmente; que en pocas escuelas se enseña; que no es comprendido por todos los hombres y, por consiguiente, que es preciso buscar y encontrar a los esperantistas con quienes relacionarse, pero, no obstante, la victoria está conseguida desde el momento que el Esperanto persiste a pesar de las contrariedades a que ha estado sometido y ha tenido que soportar. La semilla del idioma auxiliar internacional fué lanzada por el Dr. Zamenhof y su estímulo y el de sus primeros colaboradores aglutinó la población esperantista, y saliendo de la esfera del «snobismo» intelectual, salió al camino del vivir cotidiano, extendiéndose a través del mundo. Y la victoria importante está en que subsiste el Esperanto después de dos conflagraciones mundiales como las sufridas en estos treinta años últimos. Estas pruebas, tan duras y tan difíciles, son precisamente las que le han dado la necesaria madurez y la debida consistencia. Ha demostrado tener vida propia, superando la obligada etapa en que dependía de los acontecimientos; ahora su suerte ya no va ligada a las caprichosas decisiones de algunos hombres porque ya no es un objeto, sino un idioma como otro idioma cualquiera.

La victoria está consolidada hasta que llegue el día que todo esperantista presiente: cuando, en el concierto de las diversas lenguas nacionales, suene el tono uniforme del Esperanto como lengua auxiliar internacional entre todos y cada uno de los hombres.

Hasta ahora hemos enviado el BOLETIN, y es de suponer que lo hayan recibido, a todos los miembros de H.E.F. sin excepción, tanto a los socios de número como a los abonados Hemos creído con esto dar una prueba de buena voluntad, con la esperanza de que fuese justamente interpretada por nuestros amigos, transformándose todos en diligentes colaboradores de nuestra obra y en prácticos favorecedores de la elevada empresa que ella representa. Estas modestas pero cordiales páginas, que te visitan y te saludan todos los meses, consumen no sólo horas de trabajo a los que desinteresadamente en ellas se ocupan, sino también hasta las últimas reservas de nuestro presupuesto. Quisiéramos, pues, que los socios de número se apresurasen a pasar a la categoría de abonados y que los abonados que aún no han pagado su cuota -por desgracia bastantes todavía- prestasen la debida atención al aspecto material de este bello idealismo nuestro que, para continuar siéndolo, necesita el apoyo y la ayuda de los que se llaman idealistas...

De no ser así, en los números próximos nos veremos obligados a remitir el BOLETIN solamente a los socios protectores y abonados que hayan pagado la cuota correspondiente al año en curso. Estamos seguros, sin embargo, de que no habrá caso de suspender el envío a nadie.

El Esperanto en España

El idioma auxiliar universal ha tenido en España una aceptación superior a la que se pudiera esperar, dadas las condiciones geográficas, culturales y temperamentales de nuestro país.

Desde el comienzo, una pléyade de románticos, técnicos y pedagogos formó en la avanzada de los convencidos, constituyendo una brillante «élite», en la que destacaron médicos, ingenieros, militares, clérigos, maestros, etcétera. Fué aquélla la época de esplendor, que culminó cuando, en el año 1909, se celebraron en Barcelona y Valencia, el V Congreso Universal y el **Postkongreso**, respectivamente; nunca olvidó el Dr. Zamenhof la calurosa acogida que se le hizo, y los honores de que fué objeto, destacando, entre otros, la Gran Cruz de Isabel la Católica, que le fué otorgada por S. M. el Rey Don Alfonso XIII; desde entonces tuvo el Maestro en España incondicionales amigos: gran esperantista fué el famoso Torres Quevedo, gloria de la ingeniería española. De nuestro recientemente desaparecido Inglada, decía el Maestro: «Yo creé el Esperanto para que Inglada lo hablara»; tal era la maestría con que lo practicaba.

Vino la guerra del 14, y, fatalmente, como en todos los países, el esperantismo sufrió un colapso. Tras la muerte de Zamenhof siguió su progresión especialmente fomentado entre gente sencilla.

Este ha sido el signo de la segunda etapa de la difusión del Esperanto en todo el mundo y también en España; la extensión en los medios populares.

Después de la segunda guerra, vuelve pujante nuestra lengua a difundirse en todos los medios: obreros, intelectuales, técnicos; especialmente entre los médicos, se observa una esperanzadora tendencia al estudio de este maravilloso instrumento del saber, que, inventado por un médico, parece haberse hecho para que la Medicina hallara su anhelado medio de expresión.

Los técnicos, y entre ellos, con mayor motivo, los médicos, han de ser los más enérgicos propugnadores del Esperanto, y en España, afortunadamente, constituyen un fuerte núcleo de propaganda y utilización práctica, que son una lisonjera esperanza para un brillante e inmediato porvenir.

La mejor manera de favorecer al Esperanto en España es inscribiéndose en HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Socio de número ...	13 ptas.	anuales
Socio abonado.. ...	25 »	»
Socio protector... ...	50 »	»

Las dos últimas categorías dan derecho a la recepción de nuestro «Boletín».

Pri administrado kaj redakciaj aferoj de nia BULTENO, adresu ĉion al: HISPANA ESPERANTO FEDERACIO Ruzafa, 7 — VALENCIA (Hispanio).

Por causas ajenas por completo a nuestra voluntad, y muy a pesar nuestro, este número aparece con evidente retraso. Es nuestra intención que la regularidad y la seriedad sean norma entre nosotros, pues también en los pequeños detalles dan a conocer su grandeza los grandes postulados.

AMIKO HEF-ANO! Ĉu vi ne volas kunlabori en via bulteno? Ne hezitu kaj sendu al ni viajn skribaĵojn; sed nepre atentu jenan kondiĉon: Faru ilin kiel eble plej koncizaj!